

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: JACA, provinco de Huesca.—Julio Mangada Rosenörn

III^a
JARO

NUM. V.—MAJO

III^a
JARO



Ŝtuparo al Kapelo. Kastelo de Loarre.

MIAJ KOMENTARIOJ KAJ KONKLUDO PRI LA PROJEKTO DE «FRATECO»

Jus ricevinte kaj leginte la dokumenton, mi decidis aperigi la regularon sur la aprila n-ro. kaj sekve ĉi tiun artikolon; sed fine mi decidis ĉi artikolon aperigi, kiam jam la samideanaro de H. E. A., koninte bone la projekton kaj ĝin prijuĝinte, povu konscie taksi la komentariojn kaj prave aprobi aŭ malaprobi mian konkludon.

Vere mi miris, kiam mi konis la naskitaĵon de la grupo «Frateco», ĉar neniel mi povis imagi tiel reakcian projekton de tiuj, kiuj fieras dirante senĉese, eĉ dum sia sistema atakado al nuna nia organizo: «ĉiu el ni estas kiel vi, kaj ĉiuj kune pli, ol vi». Mi ne povis imagi tian atakon al individua libereco, al samegaleco, starigante *klasojn* por altrudi per plej altaj kotizoj aliĝon al regionaj organizaĵoj, forigante rajton por nomi delegiton al samideanoj; kiuj ne estu grupiĝintaj laŭ 25^a nombro, malgraŭ ke la ŝtataj leĝoj rajtigas starigi organizaĵon multe pli malgrandan, kondiĉigante maljuste la rajton interveni al la liberaj membroj kaj al aroj ne federaciigintaj.

La antaŭklarigoj de la projekto diras: «La instinkto de konservemo, tamen, konsilas la Federaciojn kaj Konfederacion ne starigi saman nivelon de egaleco por ĉi tiuj grupoj kaj membroj (ne federaciigintaj) kaj por la grupoj kaj membroj federaciigintaj. TIU ESTAS LA FUNDAMENTO POR LA DIFERENCO DE KOTIZOJ.» Per la starigo de *klasoj*, S-ro Maynar, animo kaj neerarebla gvidanto de «Frateco», kiu dum sia jam longedaŭra esperantista vivo ne sukcesis starigi en Aragono fortan movadon, malpli Federacion *realan*, celas, ke la Asocio faru la miraklon havigi al li la Federacion per altrudo de tro altaj kotizoj. Sed, kompreneble, «*ni tenas birdon*» (la nunan Asocion), kaj *nia simpla natura instinkto de konservemo konsilas al ni esti preferinde kontentiĝi tenante ĝin, kaj ne ĝin forlasi kun la espero ĉasi flugantajn*. Certe la plejmulto el la membroj de nia nuna Asocio ŝatas saman kotizon, samajn devojn, samajn rajtojn, por ĉiuj; ŝatas plenan individuan liberecon interne de la Asocio por ariĝi ĉiel aŭ resti izole koncerne arojn lokajn kaj regionajn.

La maksimuma aŭtoritateco estas al Kongreso, manifestacio

de la popolamaso kunvenanta, en kiu ĉiuj rajtas proponi kaj voĉdoni, kaj la ĝenerala voĉdonado, kiun ĉeestantoj partoprenas, kaj kiun neĉeestantoj ankaŭ povas partopreni per siaj reprezentantoj, donas la konkludojn, kiujn efektivigas la Komitato. En ĉi Kongresoj nur la membroj de la Asocio, ĉu aligitaj aŭ ne kiel kongresanoj, rajtas paroli kaj voĉdoni. La regadon kaj administradon de la Asocio havas ĝia Komitato, kiu tion faras laŭ la regularo kaj konkludoj de la Kongreso. Ne estas necese kompliki la aferon per starigo de Delegitaro kiu estas tute superflua.

Ĉiujare rondiranta Komitato centra, de Federacio en Federacion (supozante Federaciojn realajn), kun transdono de dokumentaro, materialo, k. t. p., estus vera ĥaoso, kiu forigas la konkludon de Bilbao, kiun la sperto konsilis por *centra parto de la Komitato en Madrid*. Atentu, ke ankoraŭ S-ro Maynar kaj aliaj ne plenumis la decidon de Sevilla pri la kolekto de la dokumentaro de la Kongresoj; do, kio okazus al nia ĉiujare migranta arĥivo kaj materialo? Kiel la konstanta interrilatiĝo kun la Registaro, k. c.?

Ĉiu membro de nia Asocio memstaras kun tutplena rajto partopreni per si mem aŭ per kamarado, kiun li rajtigas, kaj tial rekte, niajn aferojn; forigi de membro malpli grandan rajton ĉar li volas resti apartigata de kiu ajn loka aŭ regiona aro, aŭ tial ke li ne estas *unu el 25 membra areto*, estas tute netoleble, tio estas grandega maljustaĵo.

Ĉar Kongresoj ne kunvenigas ĉiujn regionajn komitatanojn spite de la allogo de la Kongresoj, kiel kunvenigi fojon ĉiujare, kaj nur por labori, multajn personojn (la Delegitojn)?

Oni aŭdis refoje pri diktatoraj sintenadoj, kiuj neniam ekzistis, kaj la projekto malfermas la vojon al la diktatoreco *«alten levante la flagon de la organizaĵo»*, ĉar sufiĉus, ke kiu ajn el la rajtigitoj opiniu, ke oni ne plenumis konkludon.


Nia organizaĵo estas el hispanoj, tial nur la lingvoj ĝiaj devas esti la hispana kaj esperanta. Neniam ni enmiksiĝis pri aferoj koncernantaj memstarajn estimindajn kaj respektindajn lingvojn vivantajn en nia tutlando, kiujn libere rajtas uzi inter si iliaj lingvanoj eĉ ĉe esperantaj rondoj kaj por esperantaj celoj.

La Instituto estas memstara kaj sendependa laŭ decido de la Kongreso de Madrid, kies rilato kaj laboro al nia Asocio

estas rimarkinda kaj profitdona pro ĝia regula kaj serioza funkciado, laŭ spertoj, sukcesoj, financa stato de ĝia kaso kaj celo por stimuli al ekzamenoj kaj akiro de diplomoj.

Vere, la projekto estas kvazaŭ la fabelo «la nasko de la monto», sed nepre necese estas, ke ni, samideanoj de la nuna Asocio, nin deklaru *konserve maj de nia nuna organizaĵo*, kondamnante la projekton, kiu mortigas la plenan individuan liberecon; kiu starigas *klasojn*, kiu *komplikas* la tute naturan unuiĝon en kiu individuo estas la bazo kun plena libereco por resti izola aŭ arigi laŭ deziro kaj emo ĉe la granda tuto. Mi petas: al ĉiuj, kiuj opinias same, kiel estas dirite, ke ili sin turnu al la sekretario de la Komitato de H. E. A. (Abascal, 13, Madrid) per poŝtkarto promesante daŭrigi la nunan laboron sub la nuna regularo kaj sub gvidado de la nuna Komitato; al ĉiuj, kiuj opinias male, ke ili fondu alian organizaĵon kaj laboru laŭ sia programo, tiel ni ne baros unu la alian, sed male, ĉar laborante nur por akceli la triumfon de Esperanto, ni, ambaŭ, certe antaŭeniros, helpante la komunan celon eĉ sen kunlaborado ĉe sama kampo, ĉar sukceso nia estos helpo al ili, kaj sukceso ilia estos helpo al ni; kaj eble, certe, iam, kiam estu esperantigintaj multenombregaj samlandanoj estos alvenanta ĝustatempa momento por starigi ion alian.

Julio Mangada Rosenörn.



ALDONO AL LA ANTAŬA ARTIKOLO

Jam estas dirite, kiel sisteme agadas S-ro Maynar Barnolas; jam estas dirite, kiel mi opinias, sed la ĵusajn agojn de ĉi tiu samideano mi devas konigi por plej bone juĝi la aferon, konsciante tute klare pri lia laboro kontraŭ la Asocio. Li, sur sia lasta cirkulero, parolas pri «*magnatoj*» de nia Asocio kaj diras ke «*Esperanto kun, sen aŭ spite de la magnatoj iam venkos*» kaj ke «*Esperanto estas paco kaj amo*». Pri la unua diro mi opinias, ke ĝi estas tio, kion la hispanoj konscias per la esprimo «*vero de Pero Grullo*», ĉar Esperanto estas *idealo* kaj *idealo* ĉiam floras en la maron de la homaj pasioj, kaj fine trafas ankriĝi aŭ

firme starigi; pri la dua diro, mi opinias ĝin nesincera, ĉar la dirinto praktikas la malon.

En nia Asocio estas nur superega *magnato*, kiu estas NIA REGULARO en la mano de la Direktanta Komitato en akordiĝo kun la konkludoj de la Kongresoj; kaj ĝis nun tute, absolute perfekte plenumata; kaj se iu alia *magnato* ekzistus, certe estas S-ro Maynar konsekvence de sia propra konfeso, de siaj propraj paroloj, laŭ poste oni vidos.

Tial ke S-ro Maynar estis nomata aragona voĉdonanto de la Centra parto de la Komitato je la ekfunkciado de nia Asocio, kiam en Zaragozo li estis la sola *heaano* kaj kvar-kvin aliaj en la tuta Aragono; tial ke ĉiuj du jaroj oni devas elekti novajn aŭ reelekti samajn; tial ke S-ro Maynar, kiam la membroj de H. E. A. en Aragono estis pli multenombraj, ne metis sian postenon je la konfirmo de la samregionaj *heaanoj*, nek li atentis pri la reelektio aŭ elekto de nova; tial ke la plimulto el la *heaanoj* de Aragono ne aprobas la sisteman atakadon de tiu s-ro al nia Asocio, por kiu li ne varbis adeptojn el la multenombra anaro de la grupo «Frateco», de kiu li estas prezidanto kaj «animo» (laŭ siaj propraj paroloj), pro kio evidente vidigas lia ne granda intereso al nia Asocio kaj jes lia celo mortigi aŭ aliformigi ĝin laŭ lia plaĉo, aragonaj membroj de H. E. A. en Aragono, uzante sian rajton por doni al si siajn Voĉdonantojn por la Komitato, proponis novajn, kaj la voĉdonado triumfigis la proponon. Sed S-ro Maynar diras, ke la voĉdonado ne estas leĝa, ĉar la proponintoj jam kalkulis la triumfon pro sia plej granda nombro, kaj vere estas mirigante, ke advokato tiel rezonu kaj ne atentu, ke *plimulto rajtas pli ol unu sekvata de kvar-kvin personoj ĉe aro el samrajtigitoj aganta laŭ la statutoj por doni al si verajn reprezentantojn ŝatantajn la ĝeneralan Asocion kaj ĝian laboron*. Ĉi tiu s-ro, rendevuinte kun aliaj *heaanoj*, ĉe li, por priparoli la organizon de la venonta Kongreso de H. E. A., sin kondukis kiel vidigas la jenaj paroloj interrompantaj la ĝentilan rezonadon de S-ro Carnicer (nova aragona Voĉdonanto de la Komitato): «la Centra Komitato, S-ro Sisón kaj vi, estas nenio al mi; mi estas Voĉdonanto ĉar oni min elektis per *Reĝa Ordono*, ĉar tiel mi devas esti, ĉar mi valoras pli, ĉar mi estas riĉa kaj advokato, ĉar mi estas provinca deputato, ĉar mi estas pli maljuna kaj plie mi estas prezidanto de la grupo


«Frateco» kaj, fine, «*ĉar mi volas*». Mirinda sintenado de potencega *magnato*.

Ĉi tiu granda magnato, tiel altrange titolita, la sola *magnato* konata de mi en niaj rondoj, vojaĝas kaj sin turnas al la samideanoj de H. E. A., surprizante ilian konfidemon per diroj vidigantaj la aferon de la elekto esti *diktatora ago por lin elpeli el la posteno*, aljuĝante la tute regulan leĝan fakton de la elekto aludita al komploto de la sekretario de H. E. A., ne konsciante, ke lia konduto kontraŭ H. E. A. naskis la fakton. S-ro Maynar ĵus estis en Madrido kaj rendevuigis S-ron Jozefon Perogordo (vicprezidanton de H. E. A.) ĉe S-ro Vicente Inglada, kie S-ro Maynar esprimis plendojn kontraŭ S-ro Mojado, citante leteron de ĉi tiu sinjoro tiamaniere, ke S-ro Perogordo tuj sin turnis al S-ro Maynar konstatante esti nevera la aserto pri la letero, jen ĉi tiu: «Madrid, a 7 de Abril de 1930.—Sr. Presidente del grupo «Frateco».—Muy estimado *samideano*: Tan pronto como se recibió en esta Secretaría la adjunta carta y el proyecto para nuestro muy querido y estimado Sr. Presidente de H. E. A., los hice llegar a su destino, y al poco tiempo se me devolvió todo con una nota en la que se me manifestaba que se devolviera a su origen la carta, porque, sin duda por alguna distracción, no venía firmada, y el proyecto, porque es imposible su lectura a partir de la página 3.»—Kun alta estimo, mi restas respektplena kaj samideane via.—Pastro Mariano Mojado.—La samideanoj juĝu la aferon; sed ankoraŭ atentu: sendube S-ro Maynar, spite de la paroloj de S-ro Perogordo konstantaj ke ĉiujn aferojn faras la Komitato kaj *ne unu persono*, kaj ke ne estis iam eĉ ofendeto al iu, vojaĝis al Valencio por kunveni kun S-roj Andrés Piñó (el Valencio) kaj Francisco Máñez (el Cheste), kaj evidente S-ro Maynar daŭrigis sian planon pri ofendoj kaj diktatora agado ĉe H. E. A., ĉar S-ro Piñó sin turnis per letero al S-ro Perogordo dirante estas necese malkonsenti al S-ro Mojado lian sintenadon. Ĉu S-ro Maynar klarigis al S-roj Piñó kaj Máñez la parolojn de S-ro Perogordo? Mi ne povas jesi aŭ nei; sed supozinde estas, ke se S-ro Maynar estus klariginta la konstatojn de S-ro Perogordo, S-ro Piñó ne estus sin turninta al S-ro Perogordo pri la malkonsento.

Sen komentarioj, mi transdonas al ĉiuj heaanoj la faktojn kaj nur mi konstatas: neniuj havas rajton elpeli iun ajn el

H. E. A., eĉ la Komitato, tial tion kredigi estas vole-nevole erarigi la samideanojn; oni ne povas resti senaga kontraŭ sistema laboro de kiu ajn kontraŭ la Asocio, kaj estas devo ĉies kontraŭstarigi tian laboron kaj konigi la faktojn por eviti la erarigon; oni ne povas agi fose, interpretante kaprice la regularon, kaj se estus kulpoj, klarigi, konkretigi, elpruvi ilin. La tuta arkivo (kun kopioj de leteroj senditaj de la sekretario, kun libroj de aktoj, dokumentaro, k. t. p.), vidigos la regulan funkciadon de la Asocio, aŭ la malon.

Julio Mangada Rosenörn.



K. S.

Viajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de mia 75-jara naskiĝtago mi ricevis kun confuzo, emocio kaj profunda danko.

Permesu, ke mi respondu per simplaj «Esperantaj Pripensoj».

Malaperas la homoj. La ideoj solaj meritas postvivi kaj sola ilia triumfo estas grava.


Th. Cart.

ESPERANTAJ PRIPENSOJ.

Tiuj, kiuj—dank' al nia propagando—lernas aŭ intencas lerni nian lingvon, tiuj, kiujn ni varbas, havas la rajton postuli de ni la garantion, ke nian lingvon oni ne ŝanĝos, kiel oni ne ŝanĝas la anglan, la francan, la germanan aŭ iun ajn alian instruotajn lingvon. Honestaj propagandistoj, tiun certigon ni ŝuldas al ili, tial ke internacia lingvo ne estas por ili celo sed ilo, kiun ili tute prave deziras uzi kaj utiligi.

La angla, la franca, la germana lingvoj, kiel ĉiuj vivantaj, t. e. uzataj lingvoj, evoluas senrompe. Same Esperanto, vivanta, uzata lingvo, senrompe evoluas kaj evolues, kvankam *praktike* la sama morgaŭ kiel hodiaŭ, la sama en Anglujo kiel en Francujo, en Germanujo kaj en ceteraj landoj.

Internacia lingvo, kontrakto inter la uzantoj, estas sekve multe pli *socia* ol pure *lingva* problemo. La perfekteco ĉi tie kuŝas ne en enkonduko de pli malpli dubaj plibonigoj, ĉiam



Kastelo de Loarre (Huesca).

diskuteblaj, sed en la *plena unueco* de la samlingvanoj, de la adeptoj.

Konservativuloj ni do estas, ĉar homoj *progresema*j, kiuj, konstatinte la plenan taŭgecon de la ilo, volas ĝin konservi, ĝin viviĝi per tuja uzado kaj—ne perdante sian tempon, siajn fortojn en vana, frivola, senfrukta, senfina serĉado—senlace propagandas ĝian uzon por grava, socia, internacia rolo, kiun ĝi celas.

Ĉion tion ĉi, eble pli instinkte ol konscie, komprenis la disĉiploj de Zamenhof. Per sia disciplino ili certigas kaj certigos la finan sukceson.

* * *

Ĉi tiuj ideoj gvidis de la komenco mian agadon sur la kampo de internacia lingvo kaj ĉiam pli klare, ĉiam pli energie ili sin altrudis al mia spirito, mi aldonos al mia koro, al mia esperantista konscienco. Ilin mi fidele defendis ne kiel miajn, sed kiel nepre devenantajn de l' koncepto, de l' penso de nia Majstro, kiu celis antaŭ ĉio la homaran bonon per komuna lingva ligilo.

Esperanto estas vere io tute alia ol interesa ludilo por eĉ tre kleraj lingvamantaj diletantoj. Ilia riproĉon pri «fanatika, blinda konservatismo» ni povas akcepti kun supera, trankvila indiferenteco. Nin ĝi ne atingas.

Ni firme iru nian rektan vojon!

Th. Cart.

Parizo, la 31 de Marto 1930, je la 75-jara datreveno de mia naskiĝtago.

* * *

Al S-ro Th. Cart.

Karega ĉefapostolo de nia lingvo, vi mem tute bone spertis pri la esperanta sento de la Hispanoj per ĉeesto al nia VII^a Hispana Kongreso en Sevilla; vi konstatis nian fratan senton, nian altegan respekton samtempe, al vi. Ni, do, ne bezonas reesprimi tion, kion vi konstatis, ĉar fidelaj, absolute lojalaj, ni, ĉiuj hispanaj samideanoj, staras apud vi kaj deziras vian longedaŭran bonfarton por la bono kaj prospero de Esperanto. Restas al ni nur danki viajn «Esperantaj Pripensoj», kiuj restados ĉiame en niaj koroj.

ENLANDA KRONIKO

ANDALUCÍA.

Sevilla.—Nia entuziasma samideano S-ro Enrique de Uriarte vigle laboras, kun helpo de aliaj samideanoj, por la reorganizado de la Esperanto-Movado kaj por la disvastigo de Esperanto gvidante ekzamenojn.

Jerez (Cádiz).—S-roj Rafael Fiol kaj Petro Naranjo kons-tante laboras por kreskigi nian aferon ĉi tie, farante gravan la-boron ĉe la Ateneo.

GALICIA.

Ferrol (Coruña).—Ĉi tie iom post iom Esperanto antaŭen-iras spite de la grandaj malfacilaĵoj, kiujn, trovas S-ro Olivan ĉar ĉi tie estas idisto, kiu havas grandan influon. Tamen ni suk-cesas, des pli ĉar la grava ilustrita artikolo de S-ro Lozano ape-rinta sur la madrida revuo «Estampa» bonege helpis por kon-traŭstari la influon. S-ro Antonio Porta de ĉi tie sendis al tre grava revuo por virinoj «El Hogar y la Moda» artikolon pri Es-peranto, kiu bonege tre sukcese propagandis vekante intereson kiu fariĝis adepto al nia Asocio.

ASTURIAS.

Gijón —Eksterordinara estas la movado en la tuta regiono, sed ĉi tie des pli ĉar entuziasmo al nia afero multobliĝas ĉiuta-ge, kaj ĉi tiu entuziasmo kuniĝas al tiu de aliaj samideanoj ali-lokaj per frata efika kunlaborado por la komuna celo.

La grupo «Ĥiŝona Espero» ĵus okazigis ekzamenojn disdo-nante sep diplomojn pri supera kapableco kaj tri pri elementa; same faris «Astura Esperanto-Asocio», disdonante kvar supe-rajn kaj kvar elementajn diplomojn. Emo al fakiĝo aŭ grupiĝo burĝonas mirinde, kaj deziro al posedo de diplomo estas granda.

ARAGÓN.

Zaragoza.—La grupo «Zaragoza Esperantista» ĵus sukcese fermis kurson, kiun partoprenis tri blinduloj; kaj ĵus ferminte ĝin, la grupo malfermis novan, kiun gvidas blindulo Angel Fi-guerola (unu el tri antaŭe cititaj) kaj kiun partoprenos aliaj blin-

duloj, farante tiel gravan propagandon ĉar la lernado de la blinduloj vidigas sukceson neimageblan. Aliajn kursojn gvidas S-roj Félix Sisón, Santos López kaj Miguel R. Salillas por proksimume cent lernantoj. La grupo starigis sportan fakon al kiu apartenas piedpilkudistaro, kaj ĉi tiu ekskursas por ludi al urbetoj proksimaj kaj samtempe fari esperantan propagandon, por kio spertaj samideanoj akompanas ilin. La ludvesto de ĉi tiuj propagandistoj jam efikas, ĉar ĝi estas blanka kun granda verda stelo brusten. Granda sukceso estis malfermo kaj klariĝado de kurso en Zuera, je 26 km. de Zaragoza, kien veturas S-ro Carnicer ĉiumarde kaj ĉiuvendrede posttagmeze por klariĝi lecionon al 50 gelernantoj, el ili du instruistinoj, kiuj helpas multe la laboron, kaj same faras S-roj Royo, Lera kaj Segura. La kurso funkcias en la Nacia Lernejo. Baldaŭ fondiĝos grupon.

* * *

La 25^{an} de la ĵus pasinta aprilo, la grupo «Frateco» okazigis ĉe la festosalono de l' Casino Mercantil (Komerca Kazino) rimarkindan kaj pleninteresan propagandfeston sub prezido de la generalestro kaj plej altrangaj aŭtoritatuloj de la urbo. S-ro Maynar, prez. de «Frateco» dankis la multenombrian ĉeestantaron kaj prezentis la oratoron, S-ron Antonio Jiménez Mora, organizinton de la VIII Hispana Kongreso de Esperanto en Oviedo, kaj poste konstatis ke Hispanujo kaj Zaragoza iras en la avangardo de la Esperanto-Movado, recitante fine versaĵon de la Majstro.

S-ro Jiménez Mora komprenigis per dirado flua interesa eĉ bela la idealon kiu estas Esperanto kaj prezentis altmoralajn filozofajn ekzemplojn, anoncante fine la someran kurson de la grupo (Roda, 14). S-ro Jiménez Mora impresis ankaŭ la aŭskultantaron per belega filmo pri la Kongreso kaj vidindaĵoj de Asturias. Premio al la laboro de S-ro Jiménez Mora estis varma aplaŭdado.

CASTILLA LA NUEVA.

Madrid.—Kelkaj el la centraj komitatanoj de H. E. A. ĵus vizitis la dukon de Alba, ministro por eksterlandaj aferoj por transdoni al li la saluton de la Brita Esp.-Asocio kaj la inviton

de la Komitato por la Universala Kongreso en Oxford. La duko afablege akceptis niajn samideanojn, dankis kore saluton kaj inviton, kiun li komplezus se devoj plenumotaj tion konsentus. Li interesigis pri nia afero, demandis kaj redemandis, kaj pro tio, niaj samideanoj profitis la okazon lian scivolemon kaj bonvolemon por peti, ke li nomu oficiale delegito de la Ministerio al la Kongreso de Oxford S-ron Casares, kiu jam bone scias pri nia afero, por ke ĉi tiu s-ro bone spertu per la Kongreso kaj informu la dukon; ankaŭ li promesis rekomendi nian aferon al la ministro de Publika Inst. por plejalta subvencio. La duko pleninterese petis de la vizitantoj paroli iomete la lingvon por ĝin ekkoni.

La Laborista Esp. Grupo solene festis la unuan datrevenon de la fondiĝo en la Popoldomo la dimanĉon 13^{an} de la ĵus pasinta aprilo. Multenombraj samideanoj kaj kuriozemuloj ĉeestis. S-ro Vicente Moreno koncize parolis pri la sukcesoj de la grupo dum la jaro, kiuj vidigas kaj esperigas rimarkindan abundan frukton ĉe la laboristaro. Sekve parolis S-ro Javier Maraury je la nomo de la grupo «Antaŭen», gratulante la kamaradojn de la Laborista grupo pro ilia laboro, proponante ankaŭ iniciativon pri starigo de esperantista hejmo, de pure esperantista hejmo, kie ĉiam esperantisto sin konsideru ĉe Esperantujo meze de samideanoj, apud libroj, gazetoj, revuoj, afiŝoj, esperantistaj, kaj kie neesperantistoj ricevu fortan impreson. S-ro Salvador Pérez, post salutantaj paroloj, rimarkigis, ke Socialismo, kiel ĉiuj universalaj movadoj, nur profunde, vere, reale, sukcesos per universalaj organoj de la homa penso tute egala, la sama por ĉiuj popoloj por eviti tiraneco de lingvoj, kiu estas submetado de popolo al popolo. Fine S-ro Cayetano Redondo konstatis, per sia sperto dum socialista kurso en Vieno, ke Esperanto estas tute nepra komunikilo por la laboristaro; aldonis li, ke la gvidantoj de la hispanaj socialistoj havas simpatiecon al Esperanto, kaj rememorigis parolojn de Pablo Iglesias al S-ro Azorín «se mi estus iomete pli juna kaj havus pli da libertempo, ankaŭ mi studus Esperanton.»

Baldaŭ ekfunkcios novan kurson.

La *Socialisto* de la 15.^a de aprilo raportas pri la festo kaj aperigas unue gravan artikolon de nia kompetenta samideano S-ro Azorín, titolitan «Racionalizar el idioma».

PRI LA «ĤOTO»

En Valencio estis sperta, fama poeto satira, Moĥamet-ben-Ĥot, kiu ankaŭ bone sciis ludi kordinstrumenton kvazaŭ gitaron, kaj kiu, per siaj satiraj versaĵoj, akre atakis la maŭran reĝon, pro kio ĉi tiu elpelis lin; sed la poeto ne malkuraĝiĝis kaj daŭrigis siajn versaĵojn, kiuj naskis persekuton al li, kaj tial la poeto estis devigata forkuri al Aragon, sekvante la naturan vojon, kiu estis ankaŭ tiu de la militekskursoj de l' *Cid* kaj kiu estas nun la fervojo de la Centra-Aragono. Malriĉa, malĝoja, la poeto atingis la urbon *Kalatajud'* kaj ĉi tie li restadis versfarante kaj kantante laŭ takto de sia kordinstrumento, farigante popularaj iuj liaj kantoj, speciale iu, kiu esprimis tre precize la animstatojn, kaj kiun la popolo alnomis per la nomo de la poeto «Ĥot'». La emocia forto de tiu kanto famigis kaj disvastigis ĝin, ju pli la tempo pasis des pli, akirante diversajn nuancojn laŭ la regionoj en kiuj ĝi disvastiĝis kaj enradikiĝis, pri kio diras la jena versaĵo, kantebla laŭ muziko de la valencia *ĥoto*:

En Valencio naskiĝis *ĥoto*,
ĝin oni baptis en *Aragon'*,
Kalatajud', la lulilo, estas
banata ĉiam de la *Ĥalon'*.

Ja Valencio la *ĥoton* naskis,
ja ĝi kreskadis en *Aragon'*,
sed ja *Navarro* la senton donis
por akompano de l' gitarson'.

Sed poste *ĥoto* farigis kanto
en tuta lando por ĝia gent',
en nordo same kiel en sudo,
en oriento kaj okcident'.

Ĉar ĉiam *ĥoto* kapabla estas
esprimi senton de nia kor':
ĉu la kuraĝon pri sendependado,
ĉu la ĉagrenojn de la dolor';

ĉu la pasion de l' amo granda,
ĉu la koleron de la ĵaluz',
ĉu la kortuŝon, ĉu la gajecon
kaj bonhumoron de genta ruz'...

Konstatis tion per bela strofo
saĝecon grandan de la popol';
la komponistojn allogis ankaŭ
mirinde rava la ĥoto rol'.

Pro tio vere ni, la hispanoj,
certigi povas sen ia vant',
ke ĥoto estas de ĉiuj kantoj
de l' tuta mondo la reĝa kant'.

(*Rekantaĵo*)

por kanti ĝin post ĉiu strofo el kvar versoj.)

*Pro tio ĥoto fariĝas pli kaj pli
la rava kanto en nia tuta land'
kantata ĉiam kaj ĉie ja ĉe ni
interne de l' hispana terorand'*

*Pro tio ĥoto ja tute pli kaj pli
ŝatata estas de la hispana rond';
pro tio ĥot', deirinte de ĉe ni,
fariĝis fama tra la tuta mond'.*

Julio Mangada Rosenörn.

• SEN NOVAĴO ĈE LA FRONTO •

La Eldonejo España malfermis konkurson por studentoj pri la temo «*Kiun scenon vi pli ŝatas el la verko de Remarque?, kaj rezonadu la preferkialon.*» Por la konkurso estis starigataj tri premioj el 1000, 750 kaj 500 pesetoj respektive laŭ tri klasoj el studentoj de Universitato, Meza Instruado kaj Lernejoj. La tribunalo aljuĝis la unuan premion al S-ro Luciano de la Calzada, dudekunujara, jura studento de la kvina kurso en la Universitato de Valladolid; la duan al dekkvinjara knabo Francisco Azorín Poch de la sesa abiturienta kurso en la Instituto de Córdoba, kaj filo de nia kompetenta kaj entuziasma samideano, arĥitekturo, S-ro Francisco Azorín; la trian al dekunujara infano de la Nacia Lernejo n-ro 4 de Eibar Agustín Echevarría.

La tribunalo konstatis, ke el la granda nombro da opinioj estas multaj tre altvaloraj kaj interesaj; ke la amaso el opinioj el-montras grandan unuecon pri formo kaj esenco; ke la plimulto el la opinioj evidentigas: perfektan komprenon pri la verko; ke la legantoj asimiligis al si la pacifisman senton kaj tendencon al universala frateco de la verko; ke ĉi tiu lasis profundan impreson ĉe la sentemo kaj spirito de la junaj legantoj hispanaj, evidentigante tiel la socian konvenon de la verkodisvastigo. Ankaŭ estis konstatate, ke ĉiuj scenoj, de la unuaj ĝis la epilogo, estis opiniataj abunde, sed la sceno de la «konuskavaĵo» (gajninta la unuan premion) trafis plej grandan nombron da opinioj.

La tribunalo konsistis el eminentaj literaturistoj kaj pedagogoj.

UNUA OPINIO.

Mi havas preferon al epizodo priskribata de paĝo 213 ĝis la 224.


La soldato, fariĝinte mortigmaŝino, efektivigis sian destinion pure perfekte meĥanike; la armiloj longe trafantaj kaj la uragano el armitaj popolamasoj malpermesis al li ĝis tiu momento konsci pri la kulpigo kiun signifas la vivoj forprenitaj de li. Estas nun, ĉe la fundo de la malhela kratero, kiam la milito estas perdinta por li sian kolektivan aspekton por reveni al primitiva koncepto pri individua batalo.

La tuta epopeo dum kiu homoj bataladas kaj dispecigas unu la alian estas disvolviĝinta ĉirkaŭ ĉi tiun homon, kiu konscias esti mortiginta similulon, kaj je ĉi tiu konscianta momento li vidis klare la paradokson de la milito; li vidis, kiel la abstraktaĵoj povas mortigi homojn, kaj fari fraton malamiko; li vidis la eksterordinaran gravecon de flago, de uniformo, la geografia hazardon de la naskiĝo, kaj ĉio ŝajnis al li nenio je tiu momento, intensa kaj mistera, kiu apartigas la vivon, kiu estas ago, movo, parolo, de la morto: kvieteco, silento, ripozo.

.....

Sed ĉio pasis, kaj li, sin vidante inter siaj kamaradoj, denove fariĝis atomo katenata ĉe la granda homlavango; kaj la teruran bildon barbaran de tiu mortinto kaŝas la fumo de la pafilo, morttrafema kaj matematika realaĵo de la serĝento Oellrich...

— Trafata...!



Fenestro de la stuparo en la ĝardenon de la Regino. Kastelo de Loarre.

Dume, kadavro kuŝanta ĉe la koto rigardas ĉielen laŭ gesto preĝanta kaj protestanta...— *Luciano de la Calzada.*

DUA OPINIO.

Ĉe mia hejmo mi havas fruktoĝardenon kun multaj ĉerizarboj. Kiam ĉi tiuj floriĝas, de la tegmentetaĝo, kie mi gardas la fojnon, la floraro ŝajnas kvazaŭ vasta blanka tolaĵo. Je ĉi tiu tempo, » el kazo Detering, paĝo 268.

La nostalgia rememoro de la juna kamparano, soldate vestita, havas la ĉarmon de eglogo. Por mi, ĝi estas unu el plej emociigaj de la verko de Remarque.

Detering estis subite forigata el sia vilaĝo, kie li trankvile kaj feliĉe kulturis sian fruktoĝardenon. Oni dungis lin en militistaron por militi kontraŭ alia el malamikaj soldatoj. Ĉu malamikoj liaj?

En la tranĉeoj ĝermas malamo al la milito. Lia naiva animo vibras pro la sovaĝa kanonpafado kaj kortuŝantaj veoj, pro la nekalkuleblaj mortintoj; lia animo enombrigas, terurigas pro la nekonata celo. Kaj jen, li vidas plenfloran ĉerizarbon je printempo, kaj la vidaĵo, per subita kontrasto, prezentas al li bildon pri la amata fruktoĝardeno kun la rememoro pri lia juna vivo ĉe lia hejmo kaj familio. Lia sorto estas decidata: li devas forkuri, kiel ajn, el la infero de la fronto.

«Oni kaptis lin». La milittribunalo. «Ni neniam plu aŭdis pri D.» Senkonsoliga fino. Ne miriganta, nu. Sed alloganta: emociiga kaj deviganta pensi...

Kio okazus se la junuloj decidus ne partopreni militojn, ne aparteni al militistaroj, ne partopreni kruelaĵojn kaj ambiciojn por regi similulojn, kaj ni decidus nur amon al la Naturo, al la Laboro kaj al la Paco?—*F. Azorin Poch.*

TRIA OPINIO.

Mi ŝatas, el «Sen novaĵo ĉe la fronto», la paragrafon de la III^a epizodo, paĝo 49, kiam Kropp diras:

«Milito devas esti kvazaŭ popola festo kun paradmarŝado kaj muziko, kiel en la taŭrludoj. En ĝi, ministroj kaj generaloj de la militantaj landoj iros en la arenon, banvestitaj, armitaj de bastonoj, kaj bataladi. La lando de tiu, kiu restos viva, estos la venkanta lando. Ĉi tio estus pli simpla kaj pli bona, ol tio,

kio okazas nun ĉi tie, kie bataladas tiuj kiuj ne devas tion fari.»

Mi ŝatas ĉi tiun paragrafon, ĉar se estus ministroj kaj generaloj tiuj, kiuj nepre devus batali, ne estus iuj celantaj esti ministroj kaj generaloj, kaj tiel oni evitus la militojn kaj mortojn al multenombroj miloj da homoj.—*Agustín Echevarría.*

Ĝojiga estas la ĝenerala opinio rezultanta de la konkurso okazigita en nia lando, kaj tute certe ni povas konstati, ke la opinio de la hispanaj studentoj estas tia de la tutmonda studentaro. Legigu la verkon de Remarque en ĉiuj landoj; nia devo estas tion fari, des pli ĉar ni estas esperantistoj, sekvuloj de la Majstro.

